

# LA NOV-JORKIA ESPERANTISTO

ISSN 2573-6108



*Esperantumado en la Imperia Ŝtato*

Volumo 4 Numero 1 Majo 2020



## Esperanto dum Pandemio

Timoteo BORONCZYK, Esperanto-Societo de Sirakuso



La Esperanto-Societo de Sirakuso gastigas la ĉiumonatajn renkontiĝojn per Zoom dum la pandemio (foto de Timoteo BORONCZYK).

La koronaviruso interrompas la ĉiutagan vivon de miliardoj da homoj. Fermiĝis negocoj kaj lernejoj, kaj socia distancado fortentas amikojn. Esperantujo ne estas imuna kontraŭ la pandemio. Lokaj kluboj ne povas renkontiĝi vizaĝ-al-vizaĝe. La 2020 Universala Kongreso estas prokrastita. Kaj NASK kaj la Landa Kongreso ambaŭ okazos enrete. La

ekskurzo al la flor-ĝardeno en Itako, kiun planis la Esperanto-Societo de Sirakuso, ne okazos.

Samkiel multaj homoj tra la mondo, nov-jorkiaj esperantistoj turnas sin al la interreto. La esperanta kurso ĉe la Universitato de Roĉestro estas intruata per Zoom, kaj ĉiusemajna ret-diskutro suplementas la

kurson. La Esperanto-Societoj de Novjorko kaj de Sirakuso ankaŭ gastigas siajn renkontiĝojn per Zoom.

Plie, aliaj aferoj okazas, celante helpi esperantistojn, kiuj povus senti sin izolitaj. Ekzemple, la Esperanto-Klubo de Bufalo kaj Esperanto-Societo de Sirakuso kune organizis tut-ŝtatan ret-kunsidon por esperantistoj en Nov-Jorkio. La sirakusa grupo ankaŭ organizis "Watch Party" en Facebook, en kiu spektantoj povis spekti (kaj moki) la filmon *Incubus*.

Tamen, ne senesperigu! La nuntempa krizo ne daŭros por ĉiam. Socia distancado finiĝos, kaj denove ni povos esperantumi enpersone. Ĝis tiam, la plej grava afero estas, ke ĉiuj restu sanaj.

# Kolofono

*La Nov-Jorkia Esperantisto* raportas po du fojoj jare pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. Eldonas la gazeton la Esperanto-Societo de Sirakuso.

## Redakcio

Timothy BORONCZYK  
Zerbie HYNSON

Ne nepre kongruas la opinio de la societo kaj la enhavo de artikoloj. Sendu komentojn kaj proponojn retroŝte al la redakcia teamo ĉe [novjorkio@syracuseesperanto.org](mailto:novjorkio@syracuseesperanto.org).

Aktuala kaj malaktualaj numeroj estas haveblaj senpage ĉe [syracuseesperanto.org/novjorkio](http://syracuseesperanto.org/novjorkio).

La kolofona bildo de la unua paĝo montras la Domo DEWINT en Tappan, kiu estas la plej malnova konstruaĵo en la kantono Rockland. La domo estis provizora sidejo por George WASHINGTON, kiam li estis la Ĉefa Komandanto dum la Revolucia Milito. WASHINGTON gastis dufoje ĉe la domo: la unufojo en 1780, kaj denove en 1783.

# Klubo

## Binghamton Esperanto

[facebook.com/groups/551200958567378](https://facebook.com/groups/551200958567378)  
estro Kelly BUNMAN  
[tehkellymonster@gmail.com](mailto:tehkellymonster@gmail.com)

## Esperanto-Klubo de Bufalo

[meetup.com/Bufalo-Esperanto-Club](https://meetup.com/Bufalo-Esperanto-Club)  
estro Franzo LUGLIO

## Esperanto-Societo ĉe Columbia University

[facebook.com/groups/1338197779676603](https://facebook.com/groups/1338197779676603)  
estro Jonathan Reeve

## Esperanto-Societo de Novjorko

[esperanto-nyc.org](http://esperanto-nyc.org)  
estro Raúl J. García  
[esperantosocietyofnewyork@gmail.com](mailto:esperantosocietyofnewyork@gmail.com)

## Esperanto-Klubo de Roĉestro

[groups.yahoo.com/EsperantoRochester](https://groups.yahoo.com/EsperantoRochester)  
estro Tomaso ALEXANDER  
[salivanto@yahoo.com](mailto:salivanto@yahoo.com)

## Mohawk-Hudson Esperanto Club

estroj Phyllis CLARK kaj Jonathan SAUNDERS  
[mhesperanto.org](http://mhesperanto.org)

## Esperanto-Societo de Sirakuso

[syracuseesperanto.org](http://syracuseesperanto.org)  
estro Timoteo BORONCZYK  
[mail@syracuseesperanto.org](mailto:mail@syracuseesperanto.org)

Se ne estas grupo en via regiono, starigu iun kaj sciigu nin. Ni nepre listigos ĝin ĉi tie.

# Kalendaro

**Paralela Universo** okazos la 17an de aŭgusto.  
[facebook.com/groups/691599730978382](https://facebook.com/groups/691599730978382)

**Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto** okazos la 12an ĝis la 14a de oktobro.  
[are-esperanto.org](http://are-esperanto.org)